# *Solidareco signas renkonti?on de la prezidento de Kubo en Mozambiko*



**Diaz-Canel en Mozambiko. Foto: PL**

Maputo, a?g 26 (RHK) La prezidanto de Kubo, Miguel Díaz-Canel, parolis hodia? kun kunlaborantoj en Mozambiko, reprezentantoj de solidarecaj movadoj kaj kubanoj lo?antaj ?i tie.

En kunveno markita de sentoj de amo al la kariba nacio, la prezidento eksciis detalojn pri la laboro de la pli ol 360 kubaj profesiuloj, kiuj servas en ?i tiu lando, ?efe en la sansektoro.
Díaz-Canel faras ekde hiera? oficialan viziton al Mozambiko, kie li faris oficialan interparolon kun sia ekvivalento, Filipe Jacinto Nyusi.

Same, li estis akceptita en la Asembleo de la Respubliko, kie li esprimis sian deziron plifortigi ligojn inter la parlamentoj de amba? landoj kaj dankis la mozambikan parlamenton pro akompano de la tutmonda alvoko por la ?esigo de la usona ekonomia blokado kontra? la insulo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/332425-solidareco-signas-renkontigon-de-la-prezidento-de-kubo-en-mozambiko

**Radio Habana Cuba**